

AMERIKA ESPERANTISTO



NOVEMBER, 1913

WHY NOT DO YOUR CHRISTMAS SHOPPING EARLY

We are making a special Christmas offer of **three** subscriptions to the magazine and the A. E. Book in cloth binding for only

FOUR DOLLARS

mailing both from here, and sending the recipient a special holiday card stating that they are your gift. Follow up your propaganda work of the past few months by unique Esperanto Christmas gifts to your interested friends.

AVOID THE RUSH AND SEND IN YOUR LIST TODAY. Books will be mailed in time for the Christmas delivery.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC. West Newton, Mass.

Short-Story Writing

A course of forty lessons in the history, form, structure, and writing of the short-story taught by J. Berg Esenwein. Editor of Lippincott's Magazine.



Dr. Esenwein letters prove is *practical*. It means recognition, accepted manuscripts and checks from editors.

One student writes: "I know that you will be pleased when I tell you that I have just received a check for \$125 from *Everybody's* for a humorous story. They ask for more. I am feeling very happy, and very grateful to Dr. Esenwein."

We also offer courses in Photoplay Writing, Versification and Poetics, Journalism; in all over One Hundred Home Study Courses, many of them under professors in Harvard, Brown, Cornell, and leading colleges.

250-Page Catalogue Free.

Please address,

THE HOME CORRESPONDENCE SCHOOL

Dept. 542

Springfield, Mass.



STANDARD EDITION, Cloth Bound
Postpaid for \$1.00; with NEW
Subscription to AMERIKA ESPERANTISTO
\$1.50.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.
West Newton, Mass.



THE AMERICAN THEOSOPHIST

A magazine dealing with Theosophy and Occultism, Universal Peace and the Wider Tolerance

Official Organ of The American Section of The Theosophical Society

Mrs. Annie Besant Albert P. Warrington
President Gen. Secretary and Editor
\$1.50 a year Single Copy 15 cents Foreign \$2.00
Address: Krotona, Hollywood, Los Angeles, Cal.

Specialisto pri la okuloj kaj la spina nervo

Okulvitroj prave almezuritaj al
la okuloj.

D-RO ANTONIO ROMITO

410 Liberty Ave., Room 602, - PITTSBURG, PA.

LA MOVADO

L'ESPERANTISTE FRANCAIS

Oficiala Organo

de la Societo Franca por la propaga-
gando de Esperanto

Publikigas informojn pri la orga-
nizado de la Xa Universala Kon-
greso de Esperanto en Parizo, 1914,
la Pariza vivado kaj aliaj plej in-
teresaj aferoj.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la es-
tontaj gekongresanoj, devas do legi
ĝin.

Jara abono Francujo; Fr. 2, 50

Alilando: Fr. 3, 25—Sm. 1,300

41 Blvd St. Marcel, Paris, Francujo

Sendo de la lasta numero kon-
traŭ unu internacia respondkupono.

DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.)
por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas
50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio en-
havas proksimume 40 literojn, punktojn
aŭ spacojn.]

S-ro Oscar Johnson, R. 1, Delphi, Ind.,
Usono. P. K.

S-ro Harry L. Neal, 2326 Aspen St.,
Philadelphia, Pa., U. S. A.

S-ro Sidney Lee, Box 292, Jennings, La.,
Usono.

Multaj instruistoj kaj gestudentoj volas
korespondi kun ge-samideanoj en Usono
kaj fremdaj landoj. Adresu: S-ro P. M.
Schuyler, Estro de Lernejoj, Pickford,
Mich., Usono.

S-ro Pimenov, Moriinskoje počt. otd. Tersk.
obl., stanica Staropavlovskaja, Rusujo.
I. P. K., kaj fotografajoj. Ĉiam respon-
dos.

S-ro Mansfeld, Saale Wilhelm str. 4, Mer-
seberg, Germany, interŝanĝos bildojn pri
vapor-kaldronoj kiel diversaj valvoj, ktp.
Resendos aliajn laŭ deziro.

Special Combination Offers To New Subscribers Only

For a limited time we are able to offer the following combi-
nation prices:

One year subscription to Amerika Esperantisto, \$1.00	}	\$1.50
and		
American Esperanto Book (cloth), \$1.00	}	\$2.00
One year subscription to Amerika Esperantisto, \$1.00		
and	}	\$2.50
Complete Grammar of Esperanto (Kellerman), \$1.25		
One year subscription to Amerika Esperantisto, \$1.00	}	\$2.50
and		
Esperanto-English Dictionary (Millidge), cloth, \$2.00		

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

Is ESPERANTO worth learning ?

THEN IT IS WORTH LEARNING WELL

Many of the most accurate writers
of Esperanto in this country assert
that the shortest, surest and most
practical method of learning the
language is with

THE AMERICAN SCHOOL
OF ESPERANTO

Director

IVY KELLERMAN-REED

LL. B., A. M., Ph. D.

For information address

Dr. Ivy Kellerman-Reed, *Director*

714 District National Bank Bldg., Washington, D. C.

Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at
West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

West Newton, Mass.

ONE DOLLAR A YEAR

Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukajoj kaj novajoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon.* La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone. *Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaſine.*

VOL. 14

NOVEMBER, 1913

No. 4

EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Ni multe bedaŭras la malfruecon de la Kongresa numero, kaj volas klarigi la kialon. Pro mehanikaj konfuzoj kaŭzitaj de la eksterordinara grandeco de la Oktobra ĵurnalo kaj la akompananta katalogo, kaj ankaŭ pro la malfacilaĵoj kiujn ni renkontis prizorgante pri la kreskanta abonantaro, kiun ni kun plezuro, vidas plilarĝigi ĉiutage, ni tute ne povis havi la gazeton en la poſtoficejo je la 15a de la monato oktobro. Tamen, venonte, prokrasto ne estos kaŭzita de ne-esperantistaj kompostistoj, laboristoj, ktp. ĉar ni baldaŭ havos en nia jam moderna presejo, novstilan bone funkciantan linotipon, uzatan, de estonta (ni esperas) Esperantisto. Kompreneble ni nun povos prizorgi multope la kvanton da laboro ol antaŭe, kaj tial ke ĝis nun ni havas pli da abonantoj ol ni havas presfakilaĵojn,—nun komencas nova epoko en nia historio, ni obtenas pli da specialaj presiloj por nia Esperanta laboro, kaj eltrovas ke nia abonisto nun mankas kaj devas rapidi al *ni*. Nu, ni petas nur unu demandon—*Ĉu ni ne povas esperi ke ĉiu Esperantisto nun varbos almenaŭ unu novan abonanton al la ĵurnalo, helpante nin daŭrigi la bonstilan legindan gazeton kiun ni estas certigitaj ni nun eldonas?* Ni, kun senspira intereso atendas vian respondon.

Se vi intencas fari kiel Kristnaskajn donacojn, abonojn al ia gazeto eldonata en Usono aŭ alie, bonvole memoru ke ni povas plenumi vian

mendon tuj post ricevo. La kosto ne pligrandigas, kaj per tio vi helpos tre multe la propagandon de nia afero. Skribu al ni por specialaj kombinaĵoj HODIAŪ.

LETERO EL EÜROPO

De Nia Privat-a Korespondanto

ANTAŪ—KAJ POST—KONGRESOJ

En Gent (Belgujo) kunvenis pli ol 500 samideanoj el diversaj landoj por la Esperanta Semajno, kelkajn tagojn antaŭ la Berna Kongreso. La vizitado de la Tutmonda Ekspozicio kaj la spritaj teatraĵoj luditaj antaŭ la "Semajnajoj" tre multe interesis ĉiujn. Ankaŭ aŭdigis en kunvenoj utilaj diskutaj paroladoj pri rimedoj de propagando. Specialan publikan gravecon donis al tiuj festoj la honora protektanteco de la Reĝo de Belgujo kaj la oficiala subteno de la urbestraro kiu solene akceptis la esperantistojn.

En Stuttgart (Germanujo) okazis la 8a kongreso de niaj germanaj amikoj. Ĝin ĉeestis 200 membroj de Germana Esperantista Asocio kaj 30 alilanduloj. Kiel kutime la jarkunveno de G. E. A. orde kaj discipline plenumis tre seriozan tagordon pri administracaj aferoj. La nova estraro prezidata de S-ro Von Frenckell en Dresdeno nun gvidas la Asocion tre lerte. Jam aliĝis 187 grupoj kaj 4700 anoj.

Prezidis la kongreson S-ro ĉefjuĝisto Reinking kaj ĝin subtenis la urbestraro kaj la loka gazetaro.

En Arad (Hungarujo) kunvenis la dua kongreso de hungaraj esperantistoj, kaj decidis pli viglan kunlaboradon kun U E A.

La Kuracistoj esperantistaj organizis en Londono ĉe la Tutmonda Medicina Kongreso tre interesan specialan kunsidon ĉe kiu diverslandaj doktoroj prelegis pri kuracaj temoj. Prezidis Profesoro Johnston el Dublina Universitato kaj kelkaj gravaj anglaj ĵurnaloj favore raportis pri tiu esperanta kunveno kies unulingveco strange kontrastis kun la senkuraĝiga babeltureco de la tuta kongreso.

Niaj katolikaj samideanoj veturnis el Berno al Romo por sia speciala pilgrimo kaj kongreso. Okdekon da ili akceptis la Papo en Vatikana Korto kaj ilin aŭdis esperante kanti antaŭ 3000 aliaj pilgrimantoj. Inter la Berna kaj la Roma kongresoj, okazis mezvoje la Italaj Esperanta Kunveno en Milano kies raporto ankoraŭ ne aperis.

En Parizo ĵus finiĝis en mezo de Oktobro la tutfranca kongreso de Turismo, honorprezidata de l' Prezidanto de Franca Respubliko, S-ro Poincaré, kiu ĵus popolfamiĝis kiel turisto rondvojaĝante tra suda

- Francujo sur rapida aŭtomobilo. Tiu grava Kongreso alprenis decidon favoran al Esperanto kiel internacia turista lingvo.

Similan rezolucion voĉdonis la brita packongreso en Leeds, laŭ propono de S-ro Moschels.

Ĉie en Eŭropo multaj paroladoj kaj kursoj rekomenciĝas kaj la vintro ekmontriĝas tre plena por la esperantistoj. En Parizo, oni vigle klopodas por aranĝi la Dekan Kongreson kaj la preparaj laboroj jam okupas multajn sindonemulojn. Tre kredeble tiun grandan kongreson partoprenos inter du kaj tri mil samideanoj. Estu rekomendinde ke niaj usonaj kunbatalantoj jam ekarangū opan vojaĝon al la kongreso kaj diskutu rabatkondiĉojn kun unu el la malpli gravaj transatlantikaj kompanioj.

KRONIKO NORDAMERIKA

MANCHESTER, N. H. De kiam la N. E. E. A. kunvenis en Manchester (en Oktobro) rezultis multe da diskutado en la lokaj tagjurnaloj. Kvankam unue, kelkaj el la presavizoj estis malkomplimentaj, tamen, la "Viro sub la Ĉapelo," kiu per unu el la plej gravaj ĵurnaloj, ridadis plej laŭte, nun gracie kapitulacis, kaj opinias ke Esperanto ne estas la ridinda afero kiun li antaŭe supozis. Ĉe la jarkunveno de la "Grange" kiu baldaŭ okazos, la Asocio intencas bone sin reklami. La loka grupo sub la direkcio de la E. A. N. A. Estro de Propagando S-ro Huse esperas varbi multajn novajn samideanojn al nia afero.

La Pionira Grupo havis kunvenon por la jara elektado de oficistoj kaj anoncas la jenan estraron por la venonta jaro: Prezidanto, Wm. H. Huse; Vic-prezidanto, A. A. Jenkins; Bibliotekistino, F-ino M. C. Abbott, kaj Sek-Kasistino, F-ino Daisy Flanders. La unua kunveno de la klaso por komencantoj okazis ĉe la Institutaj ĉambroj oktobron la 10an. La saman vesperon la pli alta klaso aŭdis interesan paroladon esperante de S-ro Huse, pri brilantoj kaj altkostaj ŝtonoj, montrante specimenojn kiel ilustraĵojn.

PITTSBURG, PA. Oktobron 24an, okazis la jara kunveno de la "Pennsylvania Esperanto Association," distrikta organizaĵo de la E. A. N. A. por tiu ŝtato. Oni elektis la jenan estraron por la kuranta jaro: Prezidanto, Prof. Clayton R. Bowen, el Meadville; Unua Vic-Prezidanto, L. B. Luders; Dua Vic-Prezidanto, H. M. Hoke; Korespondanta Sekretario kaj Kasisto, John M. Clifford, Jr.; Protokolisto, Kenneth D. Burke. Distriktaj Direktoroj: H. W. Hetzel, J. E. Jones, J. N. Wilson, kaj C. B. Lore.

La Korespondanta Sekretario raportis pri ĝeneralaj intereso pri Es-

peranto tra la ŝtato kaj pri la laboro farita de la asocio dum la pasintaj tri jaroj.

Oni raportis ke en la Universitato de Pittsburg, per laboro de S-ino Winifred Sackville Stoner, la Fakultato starigas SEĜON de ESPERANTO kun plena kredito. Tio estas efektive vera kaj estas bonega venko por Esperanto.

Dum la vespero de la sama tago en la parolada ĉambro de la Carnegie Instituto okazis Esperanta Paca Kongreso aranĝita de la Fako Esperanta de la Akademio de Scienco kaj Arto de Pittsburg. La kunvenon kondukis John M. Clifford, Jr., Prezidanto de tiu Fako de la Akademio. J. E. Jones, vic-prezidanto de la Akademio Fako parolis pri Esperanto kaj la Akademio. D-ro Samuel McCormick, Estro de la Universitato de Pittsburg, parolis pri "Bezono de Internacia Lingvo kiel pacigajo." S-ro Langdon Davies el Cambridge Universitato (Anglujo) parolis pri "Diverseco de Lingvo kiel Problemo por Pacdezirantoj." F-ino Marie Sylva Derdeyn kantis la Arion de la "Rêgno de Sabo" (Gounod) kaj Flandran Majkanton, kiujn oni arangis esperante speciale por tiu kunveno. S-ro George Seibel, Prezidanto de la Germana Fako de la Akademio, kaj aŭtoro de nova dramo "La Leprulo" kiun oni baldaŭ prezentos en Novjorko, parolis pri "Malhelpoj kaŭzitaj de Diversaj Lingvoj"; D-ro J. A. Brashear, fama astronomo kaj fabrikisto de astronomiaj instrumentoj bone konata en Pittsburg kiel Onklo Johano, parolis pri "Bezono de Unuformeco en Ĉiuj Sistemoj de Interkomunado." S-ino Barbazone Rutherford kantis du belajn kantojn en la angla lingvo. S-ro J. D. Hailman parolis pri la Naŭa Universala Kongreso de Esperanto en Bern.

Post la paroladoj kaj kantoj, F-ino Matilda Orr Hays organizis Pacan Ligon por Okcidenta Pennsylvania kaj varbis ĉirkaŭ 200 membrojn el la aŭdantaro. Ankaŭ S-ro Hailman prezantis kopiojn de la letero de S-ro Vezey Strong kiujn oni dissendis ĉe la Naŭa Kongreso kaj ricevis multajn subskribojn de subtenantoj al la pacaj propagando.

Oni fermis la kunvenon per kantado de "Ho Mia Land' Pri Vi" de la tutaj aŭdantaroj.

La Esperanta Fako de la Akademio ricevis multajn novajn membrojn per tiu kunveno kaj nun havas pli ol cent membrojn.

La Esperanta Fako de la Akademio de Scienco kaj Arto kondukas diversgradajn kursojn por instruado kaj praktikado de Esperanto ĉiujanĉe je 7.45 vespere en la "Teacher's Room" de Carnegie Biblioteko. La kursoj estas kondukataj de J. M. Clifford, Jr., Kenneth D. Burke, F-ino M. K. Anacker, kaj William Smith. Ankaŭ ĉiusabate de la sepa ĝis la oka vespere S-ino Winifred Sackville Stoner kondukas kurson per helpo de sia fama filineto. Vizitantoj estas tre dezirataj ĉe ĉiuj kunvenoj.

WASHINGTON, D. C. "La Internacia Klubo" filio de E. A. N. A. okazigis sian ĉiujaran publikan kunvenon ĉe la Washingtona Ĉambro de Komercu. La nunjara propaganda alvoko ĝuis bonan sukceson. Ĉiuj de Washington estis reprezentataj, kaj viva intereso regis inter la neesperantistoj, kiuj amase ĉeestis. La prezidanto de la klubo, S-ro N. S. Guimont, priparolis la eblan, vastan utilon de Esperanto por ĉiuj internaciaj organizoj, ĉefe li klarigis ĝian utilegon ĉe internaciaj kunvenoj de scienculoj. S-ro C. H. Stewart, bibliotekisto de la Usona Militcipara Departemento, plene montris la tiom facilan kiom sciencan gramatikan konstruadon de Esperanto. S-ro Thurston Wood, universitata studento, kaj prezidanto de la "Altlerneja Esperantista Rondo" priparolis la helpon kiun prezentas Esperanto por pli bone kompreni la patrinan lingvon, kaj por faciligi la studadon de fremdlandaj lingvoj. F-ino A. C. Leavitt, la sekretariino, donis ekzemplojn de la gramatiko, per kiuj estis praktike prezentata kaj subtenata la eldiro de S-ro Stewart. S-ro A. Mayer, mallonge klarigis Esperante la principojn de la radio-telegrafo per aparatoj. La aŭdantaro multe interesigis kaj la klubo gajnis anojn.

ST. LOUIS, MO. Kiel anoncite en A. E. antaŭ kelkaj monatoj, Pastro M. Mojado sukcesis enkonduki la internacian lingvon en la kolegion de la Kristanaj Fratoj. De tiam li instruas ĉiutage, *du* klasojn,—unu por la hispane parolantoj inter kiuj troviĝas ses Meksikanoj, kvin Kubanoj kaj unu el Nikaragvo; la alia por la angle parolantoj. La senlacema pastro ankaŭ kondukas klason ĉiusemajne en la Publika Biblioteko kie li instruas 30 fraŭlinojn kaj kelkajn sinjorojn; kaj nun malfermis du-semajnan klason, nokte, en la kolegio. La kolegio kaj la fratoj-estroj montras siajn progresemajn kaj esperantismajn spiritojn, per la donaco al la fervora instruisto de la ĉambroj, lumado, k. t. p. Ni laŭdas Pastron Mojadon, kaj gratulas la kolegian estraron.

DELPHOS, OHIO. La afero en ĉi tiu progresema urbo tre multe antaŭeniradas. S-ro Julian E. Fast, membro de la Estraro de Urblernejoj nun kondukas entuziasman klason el kiu, ĉiu lernanto estas lernej-instruisto. La klubo ĵus aliĝis al la Esperantista Asocio de Norda Ameriko kiel filio, kaj obtenas rajtskribajon de la nacia organizado je la nomo de la "Delphos Esperanta Klubo." La oficistoj elektitaj estas F-ino Grace Hartshorn, Prez.; F-ino Anna Welch, vic-prez.; S-ro A. J. Laudick, Sek-kas.; kaj S-ro Julian E. Fast, Kapableca diplomito de la EANA, instruisto. Bondezirojn al la Delphos Esperanta Klubo,—*Iru antaŭen!*

CHICAGO, ILL. La Gradata Esperanta Klubo nun komencas tre ageman laboradon por la venonta Chicago kongreso en 1914. Subkomitatoj estas elektitaj, kaj sendube la tieaj samideanoj havos senlacan kaj plenan vintron antaŭ la EANA kunvenos venontan someron.

S-ino Rice estas la Estrino de la Gazeta Komitato, kaj havas kiel helpantojn unu membron de ĉiu nacio, vivantan en Chicago. Tiu komitato dissendos artikolojn por la gazetaro, reklamante la aferon. Aliaj subkomitatoj estos elektataj ĉe la venontaj kunvenoj de la societo.

BOSTON, MASS. En ĉambro de la Publika Biblioteko la 4an de Novembro, la Boston Esperanta Societo kondukis tre interesan kaj profitan propagandan kunvenon, prezidatan de S-ro G. W. Lee, prezidanto de la Societo. Kvankam estis "Elektada Nokto" en la Ŝtato, multaj scivolemuloj ĉeestis kaj interesigis. La ĉefparolanto estis D-ro D. O. S. Lowell, vic-prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, kiu per tre interesaj kaj konvinkemaj vortoj klarigis la historion de Esperanto, ĝian simplecon, kaj ĝian neceson kaj praktikan utilecon. Poste, S-ino Merriam el South Framingham, kiu ĵus revenis el Eŭropo, en ĉarma kaj aŭskultinda paroladeto, rakontis siajn interesajn kaj ĝojemajn spertojn dum la somera vojaĝo per malgranda sciado de la Internacia Lingvo, kaj jarlibro de la U. E. A. Ĉe la fino de la kunveno, la aŭdantaro iris al la kunvenĉambro de la Bostona Societo, kie du klasoj por komencantoj organiziĝis.

HEBRON, NEBR. Por la tria jaro, la subjekto pri internacia lingvo tenis elstarantan lokon sur la programo de la Nebraska Ŝtata Kristancelada Kunveno. Pastro Charles P. Lang, Estro de Esperanto de la Ŝtata Unuiĝo, aranĝis ekspozicion de Esperanta literaturo kaj ankaŭ diservon lastan tagon de la kunveno, la tuta programo konsistanta el himnoj, preĝoj kaj parolado, la temo de kiu estis "La Stelo de Espero." Antaŭ la diservo S-roj R. G. Hulbert, kaj A. G. Wilson faris paroladetojn pri la Spirito de Esperanto, la praktikaj utiloj de la lingvo, kaj klarigis la elparoladon kaj sistemon de vortkonstruado. Pli ol 100 personoj ĉeestis la Esperantan kunvenon, kaj kore kantis la himnojn, respondis la legadojn, kaj parolis la "Sinjora prego," la programo enhavanta ĉiujn. La intereso sin montradis plie kiam dum la revenvojaĝo de la kristanceladaj delegitoj, oni petis al S-ro A. G. Wilson paroli al ili ree pri Esperanto. La vagono estis plenigata kaj pro la entuziasmo kaŭzita oni opinias ke la urbo Nelson, la hejmo de la delegitoj, baldaŭ havos kreskantan esperantan grupon.

"Diru, kial vi gratas vian kapon?"

"Car mi sola scias kie ĝi jukas."

* * * * *

"Cu vi opinias ke viro povus vivi laŭ kristana maniero je ses dolaroj ĉiusemajne?"

"Tiu ja estas la sola maniero laŭ kiu li povus vivi."

OFFICIAL COMMUNICATIONS

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

Central Office: Newton Center, Mass.

Reports of increased activity from all quarters are so encouraging that a successful year, beyond any previous one, is assured if only the amount of energy available can be utilized.

Past years have demonstrated beyond doubt that Esperanto growth is in direct ratio to the perfection of district and local organization. Take this fact together with the necessity for distribution of work, and it is now more than ever important that more attention should be turned to the complete organization of divisions. In our great country the Division is the largest body which can work entirely together and the largest which can hope for a general meeting once a year or more of the majority of its members. With each of these practically independent units doing its own work the national association becomes, as it should be, the representative body of its minor associations, which once a year meet in our congress to bring together the workers from remote sections and to make plans for the work of the coming year, in the interval acting as a clearing house for the minor associations and looking after isolated members or groups in unorganized districts.

It may be well to recapitulate briefly the steps necessary for the establishment and successful maintenance of the district associations, whose territory is already defined in the constitution. A charter is granted from EANA to the Division, giving it full powers to govern itself within the general provisions of the constitution, issue charters to local societies within its jurisdiction, issue membership cards to all members in its jurisdiction, collect dues from these members and forward through its secretary monthly returns of memberships and dues to the general secretary. In return for this work the division is entitled to retain one-half the fees received from members and all of the fees received for charters. Under the revised constitution it is also the duty of each division to elect annually its Councilor, who represents it in the annual meeting of the general council, held coincident with the annual congress, and who in the interval acts for it in a referendum vote upon all matters which come within the jurisdiction of that body.

Four forms of membership cards are used at present: one for general members of the national association in unorganized districts; one for members of organized societies in unorganized districts, which have been chartered direct by EANA; one for chartered societies in organized dis-

tricts, whose secretaries report through the secretary of the division, and one for isolated members within an organized division. On these cards is a space for form and number which are used for convenience of the various secretaries through whose hands they pass, and which serve to facilitate the reporting of members, especially when renewing. For example: the letter A denotes the national body and subsequent letters the district organizations in the order of their establishment. New England is AA and to isolated members is given a number in consecutive order. AA-1 would be the first general member in the division and as this number is never repeated, he may remain out one or more years and upon renewal receive his original form and number. In the same way a letter is given to each society chartered, in consecutive order, and to these is added by the local secretary a number according to the sequence of membership. These numbers are also never duplicated and always available for a renewing member. Form AA-C No. 8 shows that the bearer of the card is a member of the New England Esperanto Association, of the third society chartered (Boston Esperanto Society) and the eighth member received. The secretary of the society, the secretary of NEEA and the general secretary would at once be able to identify "AA-C-8" as the eighth member enrolled in the Boston Society; AA-F as the New Haven Esperanto Club; AA-N as the Washington Co. Esp. So. (Vermont), and so on. There is provided a three-fold filing card, with spaces for name, address, form and number; one copy of this is kept by the local secretary; No. 2 and No. 3 copies forwarded with returns to district secretary who files the No. 2 copy and forwards the No. 3 to the general secretary. At the beginning of a new fiscal year these cards are transferred to a new file as fast as renewals are received and the date of payment is entered on the card. If this system is carefully followed out each secretary will have two files: one containing the names of those who are in active membership and one of all those who have ever been members of the society. In NEEA these files are subdivided into societies, with one section for general members. EANA files by States and Cities. In both these associations there is a duplicate file in which the names are arranged alphabetically. Once started, these files become practically automatic and at the commencement of each year the registration of members, both old and new, is quickly and easily accomplished. It will be seen at once that the smoothness and success of the whole system depend upon the care and promptness of the various secretaries, and persons should be chosen for these offices who are both competent and willing to give the necessary care to the work.

Let us urge that there be more complete organization in every division. If for any reason the present arrangement makes any of the geo-

graphical divisions too large the constitution provides for further subdivision.

ELECTION OF COUNCILORS

Attention is called to Article VII., Section 1, of the Constitution, and it is hoped that as rapidly as possible elections will be held and report of same made to the Central Office. Failing to receive these returns within a reasonable time it will devolve upon the Councilors already elected to elect the remainder of the Council from those divisions which have not attended to this matter for themselves. It is much to be preferred that each division should choose its own representative. While not obligatory it has become a custom to elect the same person for president and councilor of his division.

STUDENTS' ESPERANTO LEAGUE

With the appointment of an Educational Director the field of usefulness of the SEL becomes much broader and its successful management will be of inestimable value in pushing the introduction of Esperanto into educational institutions of all grades.

As membership in the League includes membership in the Association as well, it will be to the advantage of the younger Esperantists, wherever there are several of them near together, to form a Rondo of the League. Full information will be furnished by its secretary, Harold W. Kline, 100 No. 2nd St., Darby, Pa.

NECROLOGY

Dr. W. E. Damon, Portsmouth, Ohio.

TUTMONDA JARLIBRO ESPERANTISTA

Since the decision of the last two congresses with regard to official organization and official recognition of the Centra Oficejo this book becomes absolutely necessary to every organized Esperanto Society. It contains a vast amount of information concerning the development of Esperanto and the action of its various official bodies from the Akademio down to the minor organizations. It also contains a list of all known organized Esperanto Societies throughout the world with the addresses of the various secretaries. We regret to note that the information with regard to EANA Societies is incomplete and somewhat erroneous, but we take upon ourselves the blame for a goodly portion of the errors and before the next edition shall strive to see that the C. O. has more complete and accurate information. It will help us greatly if every organized society of EANA possess a copy of this book and forward to our

Central Office information as to omissions or errors. This is due to ourselves and to the C. O. in Paris, which at a large expenditure of time and money is trying to collect within the covers of one book accurate statistics concerning Esperanto organization and activity.

END OF OFFICIAL PART.

SUR NIA TABLO

NASKITA, en Formosa, Japanujo, ESPERANTA LIBRETO; gepatroj, malbona plumo kaj hektografilo. Enhavas unuan paĝon, skribitan per la ĥina ideografo,—tial nelegebla al la recenzisto. Eble tio estas reklamo de "Kukolido," sed mi esperas ke ne. Dua paĝo enhavas vortojn kaj notojn de himno al Mikado; tria paĝo "La Espero" (feliĉe ne la muzikon). Sekvas proverboj, fabeloj kaj legendoj, kaj humoraĵoj. Lasta paĝo, reklamoj de Esp. Gazetoj, inter kiuj ni ĝojas vidi "Amerika Esperantisto." Pro ĝia ja krudeco tiu gazeteto estas alloga, kaj kune kun ĝia interesplena enhavo ĝi fariĝos bonega propagandilo.

LA VOÇO DE L'POPOLO. Ankaŭ novenaskitulo. Ĉiusemajna organo de ĥinaj socialistoj. Kvar paĝoj estas esperante presitaj, dekdu per ideografoj. La legeblaj paĝoj estas sufiĉe revoluciemaj, kaj se la ceteraj estas egale incitemaj, ne estas ia dubo ke Esperanto faros bruegon en Ĥinujo!

LA VAGABONDO. Oficiala organo de la E. V. K. Havas artan kovrilon, artajn ilustraĵojn, enhavo estas laŭ la plej bonega esperanta stilo, sufiĉe diversa kaj interesplena. Taŭgas lokon inter Eminentuloj. Malgraŭ tio, mi devas citi paragrafon, ĉar ĝi estas tiom aplikebla al la nuna multe diskutata afero de "esperanta stilo." La citajo estas "Malfarma letero al Fraŭlino Oxenford" (kaj ni bedaŭras ke ni ne povas legi la alreferitan artikolon).

"Kara Samideano,

Varman aprobon kaj sinceran komplimenton por via artikolo aperinta en La Vagabondo. Vi tre bone agis skurĝinte iom tiujn netolereblajn pedantojn, kiuj malmodeste sin starigas kiel bonstilistojn, kiel kompetentajn Esperantistojn. Jes, la lingvo kreskas nur per la uzado kaj ĉiu el ni rajtas resti libera kaj konservi sian propran stilon. Simpatian saluton de nekonata, samideano." Evidente Usono ne sole posedas mem-starigitajn stilistojn kritikajn.

INTERNACIA POLICA BULTEGO. Privata organo de la policiaj Societoj kaj izolaj Policistoj esperantistaj. Bone presita gazeto en sia tria jaro, redaktita ĉe la "Prefecture de Police," Parizo, abonebla

nur al Policistoj kaj Policaj Administracioj. La recenzita numero enhavas interesplenajn artikolojn pri la historio kaj organizo de la franca polica sistemo kaj ĝia nuna funkciado, ankaŭ sciigojn pri la esperantistaj policistoj en diversaj landoj. La graveco de Esperanto inter la legogardistoj estas bone montrita. Nur pensu, samideanoj! vojaĝante alilande vi povas ne nur esperante ĝui la belaĵojn de la diversaj landoj, sed vi ankaŭ povos esti esperante arestita!

ANTAUEN ESPERANTISTOJ! Forkurante de la Pariza poloco ni trafoj Peru'on, kie sin trovas fervoraj samideanoj kaj la dekjara, suprenomita gazeto, oficiala organo de la Perua Esperantista Societo. La pliparto de la recenzita numero konsistas el elĉerpajo de la Oficiala Gazeto. Inter la aliaj artikoloj estas unu pri "La Sinteza Kaŭčuko per la terpomoj," kaj ho vel inter la "Novaj Revuoj" Kukolido ensovis sin. Vere, la birdaĉo malpurigis multajn nestojn!

FINNA ESPERANTISTO. Sesjarulo kaj organo de la Finlandanoj. Bone presita kaj bone verkita gazeto. Enhavas vortojn kaj muzikon de "Polusstelo," "himno de Finlandaj Esperantistoj"; "Vojaĝo de finna esperantistaro en Rusujo; Esperanto inter la finnaj blinduloj" kaj alegorion, tradukitan el la verko de B. Bogh, "La Pilgrimiro de la Vero." "Kukolido" ne ankoraŭ almigris Finlandon, eble pro la tro severa klimato.

TRA LA FILATELIO. Unu el la plej gravaj de la fakaj gazetoj kaj la plej universale utila, ĉar en ĉiu lando estas troveblaj la filatelistoj. La gazeto estas france kaj esperante presita kaj enhavas riĉecon da informo pri poštmarkoj ankaŭ multe da reklamoj kiuj estas multevaloraj al ĉiu filatelisto. Felice, "Kukolido" ne ankoraŭ fariĝas filatelisto!

GREKLINGVA ESPERANTISTO. Organo de la grekaj samideanoj eldonita de la Samosa Esperanta Societo. La du ricevitaj numeroj enhavas klarigon pri la malkompreno inter la grekaj Esperantistoj kaj la registro. Parto de la gazeto estas greklitere presita kaj tiuj el ni kiuj antaŭ jaroj donis penadon kaj tempon al la studado de tiu lingvo povos kompari la facilecon de legado de la du lingvoj, Greka kaj Esperanta. La rezulto estos konvinka!

LA DU STELOJ. Ree transvojaĝante la oceanon ni trovas en "Chile" la nomitan gazeton, nun trijarulo. La enhavo estas interesplena kaj kosmopolita. Sur la kovrilo estas portreto de nia bone konata samideanino, Sino. Blaise; interne oni trovas klišaĵojn kiuj montras la "Hejmo de Washington," nia unua prezidanto; la turo Eifel kaj unu el la altegaj konstruaĵoj en la Urbo St. Louis, Usono. La teksto estas trilingva, ĉar krom Esperanton kaj la nacian lingvon oni trovas anglan represadon de "The Green Flag" el Amerika Esperantisto. Entute, la enhavo estas bone elektita kaj interesplena.

KATALUNA ESPERANTISTO. De post la barcelona kongreso Esperanto rapide disvastiĝadas en Hispanujo kaj la organizaĵoj de tiu lando estas inter la plej bonegaj. Tial, ne estas mirinde kiam oni trovas tian belan kaj bonegan gazeton, kia la K. E. La recenzita numero enhavas bele ilustritan raporton de la kvara kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio. La agemeco kaj plenumbleco de la tieaj Esperantistoj faras bonan ekzemplon al la Esperantistoj de aliaj nacioj.

Nu, la permesita spaco estas jam eluzita, kaj anstataŭ alproksimiĝi la finon de mia tasko, la amaso da ankoraŭ recenzotaj gazetoj pligrandiĝas. Estas evidente ke, ni devos ŝangi la titolon de ĉi tiu fako, kaj anstataŭ "Sur Nia Tablo" uzu la pli taŭgan titolon, "Sur Nia Planko," ĉar, la tablo baldaŭ rifuzos senrompiĝe teni la literaturan pezegajon.

Ko Fo.

BOOK REVIEWS

EL PARNASO DE POPOLOJ, by Antoni Grabowski, 224 pages, 70 cents.

This, the most extensive collection of Esperanto poetry issued to date, from perhaps the foremost verse-writer in Esperantujo, consists of six original poems, and 110 translations from 30 different languages, including Latin, Greek, and Japanese. The original, and most of the shorter translated pieces are good. But the longer selections are, almost without exception, obscure and faulty in meter, tend to cacophony and poverty of expression, and carry poetic license to the verge of anarchy. All this (judging by the argument in his original effusion "Sur unu kordo") is due to the fact that the writer regards rime as the soul of poetry, and, in retaining this same, neglects other elements (rhythm, reasonable clarity, varied and musical expression) which (to our mind) are of vastly greater importance.

HISTORIO KAJ TEORIO DE IDO, by B. Kotzin, Editor of "La Ondo de Esperanto," 144 pages, 35 cents.

The title of this book is somewhat startling to the loyal Esperantist and the first thought which comes to him is one of wonder as to whether another of our Eminentuloj is going wrong.

The quotation from Progreso at the head of the author's preface will set his mind at rest. "La Esperantistoj . . . tute ne konas faktojn pri Ido kaj la lingvon mem; kontraŭ idistoj bone konas Esperanton kaj ĝian nunan staton."

Before attempting to refute the claims of Ido and to show up its

imperfections and inconsistencies the author made a thorough study of that language from its own text-books. Every criticism is based upon a complete familiarity with the subject and such data as are given are based upon documentary evidence from ido publications, and from earlier writings of the reformers, while they were still Esperantists.

The first twenty pages of the book are devoted to the history of the Ido movement, a complete exposé of the "Delegacio" and its pseudo-official character, as well as its failure to confine its action to the object for which it was formed. The unpardonable action of DeBeaufort is discussed with wonderful impartiality when one considers the provocation.

The balance of the book is taken up by an exhaustive and detailed analysis of Ido, beginning with its alphabet and the introduction of such international letters as q, x, and y, followed by a discussion of its other features including accent, declension, plural, the invariable adjective, pronouns, verbs, derivation of words, vocabulary and euphony. It is shown to be a language of inconsistencies from beginning to end, absolutely unfit to receive any consideration as an international auxiliary language.

This book is one of the important contributions to Esperanto literature and should be in the library of every Esperanto society and every private Esperantist who wishes to be able to refute intelligently the claims of the reformers.

MIRINDA AMO, by H. Luyken, 295 pages, 75 cents.

An original novel in wonderfully clear and simple Esperanto. While it might be classed as a religious novel it is none the less readable by a person of any sect whatever. It is the history of a young man of strong character and carries him from his thirteenth year to young manhood. He is under the antagonizing influence of an atheistic uncle, a Christian mother and an Eastern Mystic. These various beliefs give the author an excellent opportunity to show his familiarity with the arguments of the Theosophist and the free thinker.

The plot is sufficiently interesting and the book is one which will be read from beginning to end with deep interest.

The chief fault with the book is the spasmodic tendency of its author to introduce the acrobatic sentence with the mistaken idea that he is using an international style. For example: on the very first page the to-be heroine "interrupts her song to regard the *through the leaves visible red sky*." On the fourth page appears an "urchin with the *shortened of his father pants*". Again, the hero "fixedly regards the pale, peaceful, nevertheless by *holy emotions illuminated face*". On page 69 the "evidently intentionally accented notes compel him to listen to a very beautiful *through the music going air*". On page 106 the head of one

of the characters "almost touches a *beautiful above the lamp hanging shade*". About the middle of the book the author warms up to his subject and lapses into an easier style,—or else the reader becomes accustomed to an occasional standing-on-its-head sentence and nothing more is noted until page 248 when the silence is broken by "tik-tak of a large *in a corner standing clock*. While such construction occasionally enables one to avoid awkward expressions, as a general thing it is a shock to the experienced Esperantist reader and must be a veritable stumbling-block to the beginner.

As a whole, this book has distinct merit and is deserving of a prominent place in Esperanto Literature.

PATRECO, by M. Wolf, translated from the French by the author, 56 pages, 35 cents.

This four-act melodrama was presented by a cast of professionals at the Bern Congress. It is a distinct problem play and to us old fashioned fellows who believe that there are some things in nature which should be withheld from general discussion or from general literature it is a trifle frank. It would be eminently fitting for senior dramatics, following the completion of a course in sex hygiene.

Its Esperanto style is good, its action easy and it is extremely dramatic. The moral which it teaches is beyond criticism.

NOVELETOJ EL LA NIGRA ARBARO, by Helene Christaller, translated by Wilhelm Christaller, (Esp. Biblioteko Internacia No. 25), 48 pages, 10 cents.

A somewhat crude and heavy translation of four short stories of which the first two are fairly readable. Scarcely worth including in so generally an excellent collection of literature as the Biblioteko Internacia.

LA INTERVIDIGO KAJ NEKONATA DIALOGO, Alfred de Vigny, translated by Sam. Meyer (Esp. Biblioteko Internacia No. 26), 40 pages, 10 cents.

A beautiful translation of extracts from the works of Alfred de Vigny. The first part is an interview between Louis XIII and Cardinal Richelieu; the second, between Napoleon and Pope Pius VII. Both are intensely dramatic and do not suffer by the Esperanto translation.

LA PATRINO, Ernst Zahn, translated by J. Šmid (Esp. Biblioteko-Internacia No. 27), 56 pages, 10 cents.

A homely little story, of the return from America of the son of Swiss peasants. While the book is tragic it holds high rank as a character study. The translation is that of a master and leaves the reader with a desire for closer familiarity with the writings of the original author.

NELLA
aŭ
LA VOJO NEKONATA
Originala novelo de Edmond Privat

CAPITRO III

Malvarmege kaj silente sidis Paŭlo en la fiakro dum li relegis la paragrafon en la ĵurnalo kaj lin penetris pli profunde la doloriga certeco pri la novaĵo. Efektive li sciis pri la invito al Nella por tiu aŭtomobila ekskurseto kaj ankaŭ li bone rekonis la nomojn de ŝiaj du amikinoj.

Dume la fiakro jam transpasis la ponton kaj rapidis al urba centro. Maldolĉa venteto frapis la vizaĝon de Paŭlo kaj venena glacia ŝvito lin mordis.

“Haltu! veturigisto, haltu!” Li fine povis elkrii per forta peno. “Reen al stacidomo!” La viro puŝetis sian flavan ĉapelegon malantaŭen kaj iom levinte la ŝultrojn klopodis por rondirigi la ĉevalon tra la strato. Li ja kutimiĝis pri tiaj subitaj kapricoj de klientoj, ne nur de klientinoj.

Ĉe la stacidomo, Paŭlo sciigis ke nenia rapida vagonaro foriras ĝis posttagmeze kaj li do forsendis telegramon al la adreso de Nella esperante jam ricevi respondon antaŭ sia forveturo.

Lian koron premis doloriga timo kaj ankaŭ la dezirego tuj alflugi al Nella por ŝin konsoli kaj dorloti. Se li nur povus preni mem ŝiajn vundojn kaj suferojn! Li ne povis toleri la personon ke ŝi suferas. Plie en lia imago sinsekvis nigraj bildoj de teruro kaj lumetaj bildoj de espero. La duajn li treege penis konservi kiel eble plej longe, sed nepre revenis la aliaj kaj lian kapon akre fajrigis tiu batalado.

Li provis uzi sian tempon ĝis ricevo de responda depešo kaj li komencis fari tra la urbo la intencitajn vizitojn. Dum kelkaj horoj li veturadis en fiakroj, rapidis en subvojo, maršadis en la stratoj, salutis, parolis, vivadis inter homoj kaj aferoj kvazaŭ en stranga songo, dum ĉiam plipeze premis la interna mordanto por lin rekapti post ĉiu vizito, post ĉiu manpremo kaj forsaluto, kvazaŭ minaca fantomo lin atendanta post ĉiu pordo, sur ĉiu ŝuparo. Tagmeze li jam rapidis al la hotelo por atendi la telegramon. Sed pasis horoj . . . nenio alvenis. Li provis tagmangi, sed li pli vere nur sidadis rigardante ĉiun enirantan kelneron kvazaŭ li nepre devus alporti al li depešon. Ĝis la lasta minuto li atendis kaj fine forflugis al la stacidomo por fari reen en Rapido la saman vojaĝon de l' nokto.

Nur ĝustatempe li alvenis. Jen ambaŭflanke trans la vagonaj fenestroj jam forrapidis la samaj pezaĝoj, kiujn li vidis matene vestigante. La samaj vidajoj alvokis rememoron pri liaj tiamaj pensoj.

Li revidis la belan noblan figuron de l'amata Nella, ŝiajn profundajn okulojn, ŝian mirindan frunton . . . sed jen io terura ekmakulis la bildon. Ĉu estus iel eble, ke tiu sankte harmonia vizaĝo estus eterne destruita per malsprita aŭtomobila akcidento? Ne! ne povus esti vere. Ŝia vundo resaniĝos. Plie, la ĵurnalo certe trograndigis. Dum kelkaj tagoj ŝi portos bandaĝeton kaj jen poste ŝi reaperos pli admirinda ol iam antaŭe! Ho kiel li ankoraŭ pli ĉiele ĝuas tiun karan belecon post pasita dangero.

Sed jen skuo de l'vagonaro kaj tremo de l'fenestroj subite vidigis al li la scenon de l' akcidento. Jen la aŭtomobilo gaje rapidanta tra la vespero kaj jen la terura renkontiĝo. Kia frakaso! Kia funebra konfuzo. Kaj ŝi, Nella, tutata lia feliĉo, ricevis tiun frapon, falis en tiujn rompaĵojn. Eble ŝi sidis sur la antaŭa loko. Ŝiaj delikataj vangoj, ŝiaj okuloj . . . Paŭlo fermis la okulojn por ne vidi. Sed nur pli klare la bildo sin trudis al li. Ŝi riskis esti mortigita . . . ĉu tio ne estus, eĉ pli bona ol terure kripliĝi, perdi la vizaĝon, rompi la spegulon de l' koro. Jes, tiu penso ja venis al Paŭlo post la vidaĵo, tiu penso pri ŝia morto preferinda al . . . kaj li sentis la honton de tiu instinkta egoismo, kiu dormas en la homa koro, eble ĉefe en la vira. Kiel estas ke tiel abomenaj, kruelaj pensoj povas eĉ eknaskiĝi, ĉe mi? li sin demandis.

Ne! Kiel ajn ŝanĝita ŝi estas, ŝi nepre restos lia Nella. Tiom pli li ŝin amos, ĉar ŝi suferas! Je ajn ili kune vivos kaj per amo li ŝin konsoles. Li fordonos ĉiujn planojn por estonto, ĉiun gloron, tutan mondon kaj nur sindonos al ŝi, tute sole al ŝi por ke ŝi havu belan vivon, ĝojan, dolĉan. La feliĉo de amata virino, ĉu tio ne estas ja sufiĉa kaj plej nobla celo por tutu vivo de unu viro? Kaj jen li jam sentis en si memfierecon, ke li tiel facile sin oferdonas. Kiel naŭzigaj estas viraj pensoj! Li denove rimarkis: Egoismo ĉiam pretos montriĝi, fanfaronado ĉiam pretas makuli eĉ plej noblajn inspirojn. Ĉu ni ne povus purigi niajn korojn kaj ilin liberigi de tiel hontindaj logantoj? Kaj la malfeliĉaj ceteraj vunditoj: La kondukisto? La kamparano kun sia veterilo? Jam li eble mortis kaj ploras hejme familio, belaj infanetoj ĵetitaj al mizerio. Strange, ke neniam antaŭe li pensis pri tio! Kian fontegon da egoismo ni havas en ni! Tamen li sin kredis bona, sentema, kompatema.

Sed jam lin atakis la furioza fluado de l'pensoj kaj lian imagon plenigis bildo pri la nuna stato de Nella. Kiel ŝi estas? Kiu ŝin flegas? Kien kaj kiu ŝin portis post la akcidento?

(Daŭrigota)

“Oni diras ke vi havis feston ĉe vi hieraŭ nokte.”

“Jes, etan nasktagan feston. Ĝi estis la dekunua datreveno de la dudek kvina nasktago de mia edzino.”—*Cincinnati Enquirer.*

LA LÖTERIA BILETO

ANDREO Ŝumraker tute maltrafis dum sia vivo. Pli ol tio li pli kaj pli dikiĝis. Rigardante la negrandan nejunulon dum li suprenrampis la altan skabelon en la oficejo de sinjoroj Hartman, Stoffel Kaj Kompanio, estus malfacile imagi, ke antaŭ tridek jaroj li estis nedika, delikate vestita junulo en Londono, alveninte tiun urbom por studi la anglan sistemon komercan.

Estis la volo de lia patro, ke Andreo restu tri jarojn en Anglujo por ke li povu perfektigi sian scion pri la lingvo kaj komerco, kaj poste revenu la patrujon kaj kuniĝu la firmon, ĝuonte gravan postenon en la Hamburga oficejo.

Sed, bankroto de iu banko tute malvalorigis la firmon. Ŝumaker, la patro, mortis je kormalsano, kaj Andreo estis postlasata senmonhavulo, senhelpe bataladi kontraŭ la malfacilajoj de ĉi vivo, senkuraĝema kaj ne amata.

Li restadis en Londono, kaj sinjoroj Hartman, Stoffel Kaj Kompanio konsideris pri lia malbonĝenco, amikemajne al li, kaj pagis al li dekunu spesmilojn ĉiusemajne. Multaj jaroj forpasis, kaj—per sparemeco, virteca konduto—li fine bone sukcesis akiri salajron de tri mil spesmiloj jare. Li estis fariĝinta tre dik. Ne la pala, rondeca dikeco de bonmanĝaja vivmaniero, sed la malseka, ruĝa dikeco de malspriteco, egoismo, kaj tro da dormado—la dikeco kiu komencas en la spirito—au, en la manko de ĝi

Lia ecaro similis tiun de la plimulto da homoj en tio, ke oni povas facile legi lin per liaj vestaĵoj—malpuraj, ornamitaj de neregule surmetitaj grasmakuloj, kaj per la fingro oni povis desegni sian nomon en la polvon sur lia ĉapelo.

Tia estis la aspekto de Andreo Ŝumaker kiam li havis kvindekkvar jarojn; malpuremulo kun rondforma, ruĝa vizaĝo ombrigata de mallongaj lipharoj, malgrandaj okuloj kiu suspektis tra okulvitroj, kaj—por tiel diri—nenia nazo.

Li neniam estis edziĝinta. Pri tia afero li neniam pripensis. Kiam li estis ankoraŭ junulo li ne havis la necesajn vivrimedojn, kaj, nun estante maljuna, li ne havas la aspekton per kiu li povas instigi amflamon.

En la lasta tempo lia logadejo ne plu plaĉis al li. Li luprenis alian, kaj dungis kadukan vidvinon, kiu estis travivinta pli feliĉigajn tagojn, kaj kiu antaŭe havis edzon kiu mortis kaŭze de tro da drinkado.

Li elspesizis mil spesmilojn ĉiujare por si mem, sia dommastrino, kaj aliaj hejmaj aferoj. La ceteron li enmetis en bankon. Ne pro tio, ke li havis ian specialan celon—tio estis lia kutimo.

Dum du jaroj li tiumaniere vivadis, tute pace, avare kaj dormeme. Jen serpento eniris lian paradizon. Li sciigis, ke sinjorino Lejton vetludas!

Nu; homoj similaj al Ŝumaker estas kutime virtemaj. Malvirtokostas monon, kaj, se ekzistas io, kion Ŝumaker nomus pekplena, estas tio, kio kostas monon. Imagu, se vi povas, kiel terura la vetludo ŝajnis al li. Laŭ lia opinio neno povus esti pli malbona ol la aĉeto de iu loteria bileteto. Ĉu ne estas hontajo—la senutila uzo de tri spesmiloj? Dum li pripensas pri kiom da ajoj oni povas aĉeti per tri spesmiloj, lia brusto ŝvelas kun indigno. Tio ja estas pli malbona ol la aĉeto de tabako!

Severmaniere li priparolis la aferon kun sinjorino Lejton, kaj per malpura montrafingro li emfazis la pruvon, ke ŝi estas krimulino.

Ŝi estis maldika, neforta kvindekjara virino, facile senkuraĝigata, kaj ŝi humile elaŭskultis Ŝumaker, on.

“Eble mi malbone agis, sinjoro Ŝumaker, kaj pro tio, ke vi tiel lerte pruvis al mi min pekon, mi promesas al vi, ke neniam refoje mi aĉetos loterio-bileton. Dufoje ĉiujare dum la pasintaj ses jaroj mi aĉetis tiajn biletojn. Mi ĉiam esperis, ke mi trafos lotajon, kaj, pli ol tio—vi komprenas—mi povos. . . .”

“Hergott!” interrompis Ŝumaker. Kutime lia kapableco uzi la angilan lingvon suficiis por esprimi liajn pensojn, sed kiam li ekscitigis, li duone forgesis, kaj uzis nedecajn esprimojn el sia patra lingvo.

“Kio!” li ekkriis; “ĉiujare vi elspezis ses spesmilojn por loteriaj biletetoj? Dekok spesmilojn ensume? Kion utilas al vi la *verfluchte* loterio? Kion vi estas gajninta? Nenion!”

Sinjorino Lejton denove certigis al li, ke ne plu ŝi aĉetos tiajn biletojn, kaj, por ekmontri al li kiel serioza ŝi estas, ŝi surmetas sur la tablon la ĵusriceviton bileton. “Jen,” ŝi humile diris, “gin prenu, kaj faru je ĝi, kion vi volas.”

Sed li ektremis pro malŝato dum li rigardis la bileton, sur kiu vidigis la vortoj: “Fortuna Gesellschaft” kaj la nombro 5400. Helpate de multaj germanaj adjektivoj, li gravmiene juras, ke li ne tušetos la malbenindan ajon.

Ŝi do remetis la bileton en sian monujon, ankoraŭ jurante ke ne plu ŝi vetludos. La okazaĵo finiĝis, kaj Andreo ekdormis en sia braksego.

Tuta semajno forpasis, kaj oni preskaŭ forgesis pri la afero. Iun tagon, dum li estis leganta la “Hamburger Tageblatt”, li ekvidis artikolon en kiu estas aironcate, ke la posedanto de la bileto, No. 5400, estis gajninta la ĉeflotajon, 200,000 spesmilojn.

La ĵurnalo deflirtis el liaj manoj; liaj molegaj vangoj paligis, kaj lia bušo malfermiĝis por murmureti la nomon—Tereso Lejton!

Tuje lia animo pleniĝis je envio kaj iaspeca kolero. Lia spirita koler-

eco estis subite interrompata de alia penso. - Ĉu sinjorino Lejton ankoraŭ ne scias, ke si trafis la ĉeflotajon? Supozeble, la afero bezonas du—tritagojn por eltrovi la posedanton de la bileteto, No. 5400. Kion li povos fari en du—tri tagoj? Aĉeti la bileteton? Ne, tute ne! Certe, sinjorino Lejton tuje konjektos pro kio li malsparas tri spesmilojn!

Li forte pensadis kelkajn minutojn—pli forte aliam antaŭe en sia vivo—kaj, fine la nutra solvo sin prezentis. Li devas edziĝi kun ŝi! Sed kiel li tion povos fari antaŭ ol forpasos tri tagoj?

Sinjoro Ŝarp povas lin helpi. Ŝarp iam dejoris en oficejo de iu advokato. Li vizitis tiun amikon.

“Sinjoro Ŝarp,” li diris, “ĉu vi soifas? Ĉu vi akompanos min al la kafejo kaj trinkos kun mi?”

Kun surprizo, Frederiko Ŝarp rigardis la parolinton.

“Pardonu!” li respondis.

“Ĉu vi akompanos min por havigi trinkajon?”

Sen pli da vortoj, Ŝarp surmetis la ĉapelon.

La du homoj ĝenerale ne estis kamaradoj—sed trinkajo ja estas trinkajo, kaj—sinjoro Ŝumaker estas la pagonto!

Ili eniris trinkejon, kaj oni liveris viskion kaj sod-akvon al Ŝarp. Pro tio, ke miksita trinkajo kostas pli da mono ol la nemiksitaj, sinjoro Andreo petis, ke oni alportu al li glason da limonado. Post la doloriga procedo—la pago de la postulita monsumo—Šumaker senſanceleme demandis al sinjoro Ŝarp.

“Kiamaniere oni povas edziĝi en la plej mallonga tempospaco?”

Iomete surprizita, Ŝarp rigardis Ŝumaker-on plenatente. Rampis en lian cerbon, la ideo ke Andreo ja freneziĝas. Nur post kiam Andreo refoje demandis: “Kiamaniere oni povas edziĝi en la plej mallonga tempospaco?”, Ŝarp respondis,

“Speciala licenco.”

“Tio estas la.....nu, kiel mi povas havigi al mi specialan licencon?”

“Tri-centoj da spesmiloj; ia bona kialo, kaj jurdeklaracio, ke ne ekzistas leĝa malhelpaĵo.”

“Tri centoj da spesmiloj? *Hergott!*” Kaj subite li paligis ĝis la koloro de kreto. Tamen, rememorigante la grandan premion, kion li nepre devas trafi, li rekuraĝigis, kaj baldaŭ liaj vangoj havis sian kutiman koloron.

“Kio povus esti ‘bona kialo?’” li demandis.

Sinjoro Ŝarp pritraktis duondekduon. “Se vi povos pruvi iun el tiuj, kaj ankaŭ vi povas jurdeklari, ĉio estos bona.”

“Sed,” respondis Ŝumaker, “mi ne povos pruvi iun el ili.”

“Nu! Pro kio vi volas edziĝi?”

Andreо kvazaüe ne aüdis la demandon.

“Cu ne estas io alia?”

“Ne!” respondis Ŝarp. “Vi povus mensogi, sed Dio vin helpu se vi tion farus!”

Sumaker konfesis al si, ke li devas mensogi. “Supozante ke mi havigus la licencon, kiam mi povos edziigi?” li demandis.

“Se vi estus ruza, tion vi povos fari la postan tagon. Sed, vi devas esti *tre* ruza.”

Tio sufičas. Sumaker pagis alian trinkajon por sia kunulo, kaj plue demandis pri tio, kion li devas fari kaj diri. Ĉion Ŝarp klarigis al li, kaj Andreо kuris al la oficejo. Li diris al sinjoro Haſtman, ke li estas malsaneta; surmetis sian verdan palton (antaüe ĝi estis nigra!) kaj forlasis la oficejon. Lian foriron Ŝarp eknotis, kaj baldaŭ la afero estis konita inter la tuta komizaro.

Sumaker iris rekte al la banko, kaj je la unua fojo en sia vivo, li elprenis tri centoj da spesmiloj. Poste li revenis al sia loĝejo, kaj pro tio surprizigis sinjorinon Lejton. Li diris al ŝi, ke li estas malsana, kaj ja bezonas etan libertempon. Si komplimentis lin pri lia saĝeco—certe li havis nebonan aspekton tial, ĉar li estas tiel malfrankvila. Malsaguloj ofte estas ruzaj. Sed, la ruzeco montrita de Andreо estus honorinta iu lertulon. Post kvin minutoj, li tute libere povis spiri, ĉar li sciigis, ke sinjorino Lejton ne ankoraŭ konas pri la rezulto de la “*Fortuna Gesellschaft*” loterio.

Tiam li ruzeme komencis la aferon. Survoje al la domo, li estis lerninta tion, kion li devos diri al ŝi, kaj nun tion li plenkuraĝe diras. Sinjorino Lejton tute komprenis pri kio li tiel arde priparolas, kaj en ŝia animo ŝi iom bedaŭras, ke eble en la estinteco ŝi estis neĝentila al li; ŝi rememoras kiel maldolce ŝi nebonmienigis lin antaŭ siaj okuloj.

“Mi rapide maljuniĝas,” ekdiris Andreо, kun tremaj lipoj. “La hodiaŭa malsaneteco montras al mi, ke post mallonga tempo mi devos pagi la ŝuldon de l’ karno, kaj viziti alian sferon—ĉu pli bonan ĉu malpli bonan mi ne scias. Vi estas estinta tre amikema al mi, sinjorino Lejton—tre amindema al mi, Tereso, kaj la ideo pri kio okazos al vi post mia morto turmentas mian animon. Ankaŭ vi, amiko kara, maljuniĝas, kaj ne multe plu vi povos laboradi. Mi havas monon—dudek mil spesmilojn en la banko. Tio tre utilos al vi. Mi ametas vin!”

Li ĉesis por spiri; dume ŝi mallevis la palpebrojn, kaj ruĝiĝis. Li prenis ŝian kadukan manon en sian manegon, kaj kun tremo en sia voĉo li daŭriĝis.

“Cu vi edziniĝos min?” li elpuſis.

“Ho, sinjoro Sumaker!”

“Cu vi edziniĝos min?” li repetis.

Unu momenton ŝi silentis, kaj dum ĝi pripensis la aferon. Si enpense komparis Andreo 'n kun sia antaŭa edzo. La gaja, bela sinjoro Lejton—la ebriĝema Lejton estis multe, multe malsimila je Andreo, kaj kiel pasie li amindumis ŝin! Sed, Andreo amproponis, kaj posedas du-dek mil da spesmiloj ĉe la banko. Kaj, pli ol tio, tio, kion ĝi diris estas tute senerara; ŝi ja maljuniĝas. Videble li enamigis je ŝi. Tial ŝi fine levis la palpebrojn, kaj murmureatis sian respondon. Se li iam estus leginta amnovenon, li tiuj sciigus pri kio li devus fari. Li estus ĉirkaŭ-preninta ŝin kaj surmetus kison sur ŝiajn lipojn—ja, estas multo, kion oni povas ellerni per noveloj! Sed, Andreo konis nenion, kaj pensas malplie, pri tiaj sensencaj.

Kun preskaŭa sufokpremeco (grandaj ŝvitgutoj ruligis la vangojn) li alparolis al ŝi, ke jam de longe li esperis por ĉi tiu feliĉiga momento. Li subite proponis libertagon farotan ie en la apuda kamparo; ke morgaŭ frumatene ili fariĝu geedzoj.

Si estis iomete timema, sed ŝi neniel suspektis, ke troviĝas io tro eksterordinara en la afero.

Estu tio kiel tio estis; la morgaŭan tagon ili fariĝis geedzoj. Andreo maldikiĝis je du funtoj dum la jusantaŭaj dudek kvar horoj pro la timo. ke sinjorino Lejton sciigus pri la gajno de l' lotajo.

Fine, kiam li aŭdis ŝian "Jes!", li preskaŭ dissaltis pro ĝojo.

Li estas riĉulo. Ne pli Andreo Ŝumaker laborados en la oficejo de sinjoroj Hartman, Stoffel Kaj Kompanio. Li deprenis el la banko pli da mono, kaj la feliĉa paro foriris en la kamparon por tutlibere ĝui sian miellunon.

Laŭ peto de Ŝumaker, Ŝarp sendis al li kelkajn numerojn de la "Hamburga Tageblatt", inter kiuj estis tiu numero en kiu vidiĝis la artikolo pri la bileteto, No. 5400. En la dua vespero, li tralegis la ĵurnalojn sed diris nenion koncerne la loterian aferon. Li preferis, ke ŝi mem trovu la artikolon.

Estas la tria tago, kaj ŝi ne ankoraŭ ekvidis tiun artikolon. Tial li opiniis, ke estus aminde se li konigus al ŝi ŝian bonĝancon. Subite li brue ekkriis, "Hergott!"

Si demandis al li, "Kio okazis?"

"Kiu estas la numero de via loteria bileteto?" li blekpetis.

"Kvinmil kvarcent," ŝi respondis, ekscitita. "Pro kio.....vi ne volas diri, ke ĝi ion gajnis?"

"Ion gajnis? *Potzsteufel!* Gi gajnis la ĉeflotajon—ducent mil spesmilojn! Legu!" Kaj li etendis la ĵurnalon, metante sian malpuran fingron ĝuste sub la artikolo.

Sinjorino Andreo Ŝumaker ne legis! Si ne povis legi! Si ŝtoniĝis! Malferminte la palajn lipojn, ŝi tremvoće ekparolis.

"Vi, Andreo mia; *vi* estas riproćinda—vi estas la kulpulo! Tial, ĉar vi tiel malgentile alparolis al mi pri la aĉeto de tiu bileto, mi, la sekvantan tagon, vendis ĝin al sinjorino Armstrong!"

Poste, tre baldaue, rimarkinte la signon de forta doloro sur la vizaĝo de sia edzo, kaj opinante—sensuspektema estaĵo!—ke ŝia riproĉo ja kaŭzis ĝin, ŝi tute forgesis pri sia perditajo, kaj subite fariĝis karesema.

Si ĉirkaŭprenis sian edzon, kaj ripozigis lian ŝvitantan kapon sur sian kadukan bruston.

"Karulo mia, ne maltrankviliĝu pro la afero," tre dolce ŝi diris. "Vi estis prava pri la vetyludo, kaj—nu, ni ankoraŭ havas unu la alian?"

"Jes!" ŝi bojis, "ni havas unu la alian!" Kaj, post kiam li tute komprenis tion, kion signifas tiuj vortoj, li refoje kriegis, "Hergott! Ni havas unu la alian!"

Kaj li svenis.

El la angla tradukis,

JNO. L. STANYAN.

PECJO.

POPOLA FABELO EL MORAPIO.

FSTIS iam reĝo; li havis filinon tre belan. Sed ŝi ne obeis sian patron. Tial li forpelis ŝin kaj ordonis al servisto, ke li konduku la princinon profunden en arbaron kaj lasu ŝin tie al ŝia sorte. La servisto faris, kiel estis ordonita al li kaj kondukis ŝin en izolan malluman arbaron, kiun homoj neniam pasis kaj nur diversaj bestoj enloĝis.

La princino sentis en sia koro la gravecon de sia sorte; ŝi ploris kaj petis la serviston, ke li rekonduku ŝin al homoj; ŝi promesis al li, ke ŝi neniam revenos al sia patro, por ke la servisto ne estu punata; ke ŝi kaše vivos kaj per laboro akiros sian panon; li nur ne forlasu ŝin en tiu terura arbaro.

Sed ŝiaj petoj estis vanaj. La servisto devis juri al la reĝo, ke li agos laŭ lia ordono; do, ŝiaj petoj kaj promesoj ne kortuſis lin; li forlasis ŝin—ſi estis sola.

Jen, ŝi surgenuis kaj preĝis al Dio, ke Li ne forlasu ŝin, donu nutron al ŝi kaj protektu ŝin kontraŭ sovaĝaj bestoj.

Dio plenumis ŝian peton. Ŝi trovis sukplenajn berojn, avelojn, fagnuksojn, diversajn radikojn kaj herbojn, ankaŭ fonton, kaj fine ŝi eltrovis kavan kverkon; en tiun ŝi transportis muskon kaj sekajn foliojn, kaj ĝi servis al ŝi kiel loĝejo. Nokte ŝi baris la enirejon per branĉoj, por ke neniu sovaĝa besto povu eniri.

Tiel ŝi vivadis, kaj, ne povante interrilati kun homoj, ŝi konfidigis al ŝi malsovaĝajn bestojn en la arbaro. Ŝi allogis ilin, kaj baldaŭ sukcesis al ŝi alvenigi ilin.

Post kelke da tempo Dio donacis knabeton al ŝi; li estis tiel ĉarma, ke ŝi pro ĝojo preskaŭ forgesis sian malfacilan sorton. Estante tre pia, ŝi ne volis lasi sian infanon ne baptitan. Dum ŝi pripensis, kiamaniere oni povis bapti lin, ŝi vidis starantan antaŭ ŝi viron maljunan, respektindan, kun longa blanka barbo kaj kun ŝlosilaro en mano. Li estis la sankta Petro.

Li diris, ke li estas sendita de la bona Dio, por bapti la infanon. Li portis lin al la fonto, baptis lin kaj nomis lin Petro. Kiel baptodonacon li pendigis fajfileton per ŝnuro ĉirkaŭ lia kolo kaj diris al lia patrino ke ŝi neniam forprenu ĉi tiun ludilon de li. Tiam li forlasis ilin.

Post lia foriro la princino, scivola, kiel efikos la fajfileto, tenis ĝin al sia bušo kaj fajfis. Subite dissivoiĝis la branĉoj, kiuj kovris le enirejon de la kaverno, kaj kapreolo staris antaŭ ŝi. Ĝi kušiĝis ĉe la infano kaj prezentis al li sian lakton. La infano suĉis ĝin avide, ĉar lia patrino ne povis mammutri lin. Nun la besto venis ĉiutage kelkfoje, kiam Peĉjo estis malsata kaj kiam lia patrino fajfis per la fajfileto. Kaj la infano prosperis per tio bonege.

Kiam la vintro proksimiĝis, la princino havis grandan zorgon. Si ne posedis varmajn vestojn, nek por si, nek por la infano. Si do preĝis tre intense al la bona Dio, kaj tiam aperis al ŝi sankta Petro en songo. Li havis en la mano bastonon kaj forkondukis ŝin kune kun ŝia infano el tiu sovaĝa regiono. Ili iradis orienten kaj li montris al ili dometon.

Jen, ŝi vekiĝis kaj pripensis la songon. Si obeis la avizon, prenis sian infanon sur brakon kaj migradis kun li orienten, ĝis kiam ŝi venis vespere al dometo. Maljuna ermito loĝis en ĝi. Li akceptis ilin afable, ĉar ankaŭ li estis per songo preparita, ke princino venos kun sia infano kaj logos kun li en la dometo.

Li alportis mangajon kaj trinkaĵon por ŝi kaj por la infano, kaj invitis ilin, resti ĉe li. Tion ŝi faris kun ĝojo kaj ili ambaŭ tiel trovis helpon.

Kiam Peĉjo estis kelkjara, la patrino instruis lin, mem uzi la fajfileton, kaj kiam la knabo fajfis per ĝi, birdoj, sciuroj kaj junaj kapreoloj alvenis, ronde ĉirkaŭis la infanon kaj ludis kun li. Tiamaniere li kreskis. La ermito lernigis lin legi kaj skribi kaj ekzerci aliajn artojn, kaj kiam li estis plenkreska, lia patrino opiniis, ke nun estas tempo, ke li venu inter homojn. Si ĉiam pripensis, kiamaniere ŝi tion povus efektivigi.

Jen, denove aperis sankta Petro al ŝi en songo kaj diris al ŝi, ke ŝi konduku Peĉjon—kiu efektive estis jam granda Petro—al la fonto, el kiu li estis baptita. Dekstre de ĝi, en distanco de kvin pašoj, ŝi trovos en la tero ringon. Si levu ĝin, kaj kion ŝi trovos sub ĝi, tio servu al Peĉjo por lia vojaĝo.

Kiam ŝi vekiĝis, tiu ĉi songo estis tiel viva antaŭ ŝia animo, ke ŝi tuj ekiris al la fonto. Vere, ŝi trovis sur la avizita loko la ringon el fero, grandan kiel rado de veturilo kaj fiksitan sur kaŝita pordo, kiu de herboj estis kovrita kaj tute ne konebla. Si levis la ringon per tuta sia forto kaj kiam la pordo estis malfermita, ŝi vidis ŝtupojn en kelon antaŭ ŝi. Si iris malsupren kaj trovis belan nigran ĉevalon kaj apud ĝi sur muro kompletan armilaron, kian kavaliroj portis. Si tre ĝojis kaj tuj alirigis sian filon, por montri ĉion al li. Li iĝis pro la ĝojo preskaŭ freneza

kaj tuj provis la armilaron, kiu estis tute konvena por lia korpo.

Tiam li saltis sur la ĉevalon kaj diris: "Adiaŭ, kara patrino, mi nun rajdos en la mondron kaj, post kiam mi ekokupis la tronon de mia avo, mi kunvenigos vin!" Lia patrino, sciu, jam estis dirinta al li, ke li estas regido.

Li do forrajdis. Sed, kiam li estis rajdinta dum kelke da horoj, rabistoj atakis lin, forrabis de li ĉion, la ĉevalon, la kirason kaj la glavon, elpikis liajn okulojn kaj forlasis lin senhelpan. Li estis tre malfeliĉa kaj tute malespera pro sia situacio kaj ne povis helpi al si. Fine li ekdormis pro laceco kaj songis jenon: Lia baptopatro, sankta Petro aperis al li kaj diris: "Uzu vian fajfileton kaj kiam post la fajfo sciuro alvenis, kaptu ĝin, devišu per ĝia vosto matenan roson kaj lavu per ĝi la okulojn; vi tiam vidos denove. Post tio iru ĉiam rekte orienten, ĝis kiam vi venos al tiu loko, kie la rabistoj bivakas. Kašu vin tie post arbo, kaj kiam ili ekdormis, forprenu de ili vian proprajon kaj forrajdu orienten."

Jen, li vekiĝis, serĉis sian fajfileton, sed—ho, terure!—ĝi estis mala-perinta.

Li ĝemis kaj ne povis helpi al si pro la doloro. Rekvietiĝinte, li pripensis, kien la fajfileto eble iris, ĉar la rabistoj ja sciis neniel ĝian valoron kaj kredeble ne proprigis ĝin al si. Eble ĝi nur estis forſirita kaj kuſis ie proksime. Sed, ĉar li estis blindigita, serĉado estis malfacila por li. Li rampis ĉirkaŭe sur la tero kaj palpadis per siaj manoj ĉirkaŭ si. Fine, post multaj vanaj klopodoj, li trovis ĝin kuſantan inter herboj. Li ĝoĝis, tenis ĝin al la lipoj kaj fajfadis. Tuj alsaltis sciuro kaj sidiĝis sur unu lia ŝultro. Li kaptis ĝin per mano kaj deviſis per ĝia vosto la roson, ĝis kiam ĝi estis tute malseka. Tiam li lavis per ĝi la okulojn kaj —mirakle!—kia ĝojo! Li vidis denove.

Tiam li migris orienten, pli kaj pli malproksimen, ĝis kiam li vespere venis al maldensejo kaj havis antaŭ si la restejon de la rabistoj. Li kaſis sin, ĝis kiam noktiĝis kaj kiam la rabistoj dormis, li aliris sub la lumo de la luno, almetis rapide la kirason, kiu pendis sur arbo, malligis sian ĉevalon, alzonigis la glavon kaj forrajdis. Li rajdadis dum la tuta nokto, ĉiam orienten, kaj nur matene li permesis al si ripozon.

Tiam li venis en urbon, kiu tutu estis nigre ornamita. Ĉiuj domoj estis drapiritaj de nigra drapo, de ĉiuj tegmentoj flirtis nigraj flagoj kaj ĉiuj homoj, kiujn Peĉjo renkontis, estis vestitaj de funebrovestoj. Li tre miris pro tio kaj demandis la mastron de la gastejo, kie li loĝigis sin, kion tio signifas? Jen, li sciigis, ke proksime de la urbo, en arbaro loĝas granda drako, kiu ĉiutage manĝas unu homon. Pli frue ĝi mem forportis la unuan renkontinton el la urbo aŭ la kampo. Sed, ĉar neniu estis certa pri sia vivo kaj ĉiu timis eliri, oni decidis, ke loto destinu tiujn, kiuj devos sin liveri al la drako kiel manĝajon. Ĉi tiu foje la loto trafis la regidinon kaj tial estas la ĝeneralaj funebroj.

Petro demandis tiam: "Cu neniu estas tiel kuraĝa, ke li mortigas la drakon?"—"Ho, kuraĝaj estis jam multaj," diris la mastro, "sed la haŭto de la drako estas tiel dika, ke neniu armilo povas penetri tra ĝi; ĉiu desaltas kaj disrompiĝas. Jam multaj kavaliroj elrajdis, por mortigi la drakon, sed neniu sukcesis, neniu revenis. La reĝo promesis la manon de sia filino kiel premion al la mortiginto de la drako; tio instigis multajn,

riski la entreprenon kaj jen-morgaŭ la princino mem estu oferata kaj devos perdi sian vivon!"

Petro multe pripensis, yeninte en sian loĝejon, ĉu li povus kuraĝi la drakon mortigi per sia glavo; li sentis sin incitita, riski tiun aventuron.

Kiam li dormis, lia baptopatro, sankta Petro denove aperis al li en songo kaj diris: "Petro, alzonigu vian glavon kaj rajdu frumatene, kiam la suno suprenigas, en la arbaretan de la drako. Tie vi vidos la beston kušantan. Steliru al ĝi de malantaŭ, de norde, kaj dehaku ĝiajn kapojn, eltranĉu la langojn, kumportu kaj konservu ilin bone."

Kiam li vekiĝis, la matena krepusko komenciĝis. Li do rapide sin vestis, saltis sur sian ĉevalon kaj galopis al la arbareteto de la drako. Li faris, kiel la songo estis ordonita al li, ligis sian ĉevalon al arbo kaj steliris malrapide de norde, ĉiam spicante, antaŭen. Fine li ekvidis la beston, sed ĝia aspekto estis tiel terura, ke li preskaŭ perdis la kuraĝon. Ĝia korpo estis dika kaj longa, finiĝis per vosto kaj tuta estis kovrita de skvamoj. En la suprā ekstremo estis sep teruraspektaj kapoj, unuj ĉe la aliaj. Ĝi dormis ankoraj, kaj tio estis bonĝanca por Petro, ĉar li povis tute proksime alpaſi. Li prenis la glavon, sibligis ĝin tra la aero kaj dehakis per unu bato unu kapon de la monstro. La besto tordiĝis supren, sed li svingis denove la glavon kaj la dua kapo defalis. Tiel li agis, ĝis kiam ĉiuj sep kapoj kuſis sur la tero. Tiam li prenis ĉian kapon aparte per mano, eltranĉis iliajn langojn, enpoſigis ilin kaj rerajdis en la urbon.

Dum tio okazis, oni preparis en la urbo la lastan iron de la princino. La tutaj popolo kolektiĝis, la pastroj venis, la induloj de la regno kaj la parencoj de la princino. Kun torcoj kaj kun funebromuziko ili akompanis ŝin, dum ĉiuj sonoriloj sonoris, ĝis la arbareteto de la drako. La princino paſis kun klinita kapo, tutnigre vestita, la kapo kovrita de nigra vualo, meze inter la torĉportistoj.

Kiam la procesio estis sur la loko, oni vane spionis al la drako. Nenio moviĝis. Fine oni proksimiĝis kaj trovis la beston morta. Sed nur la torso kuſis tie, la kapoj estis nenie troveblaj.

Kia ĝojo kaj feliĉo estis tio! Ĉiuj spiris libere kaj ĝojkriis, ĉar oni estis liberigita de tiu skurgo.

La princino estis triumfe rekondukata. Si devis ŝanĝi sian funebren veston per blanka vesto kaj sin montri al la popolo. Ĉiuj deziris vidi la mortiginton de la drako. La popolamaso disiĝis, kaj viro paſis antaŭen; li metis la sep kapojn de la drako antaŭ la piedoj de la princino, kaj tiu ĉi viro estis— ŝia ĉambrolakeo. Li intencis jam de longa tempo akiri por si la premion por la mortigo de la drako, kaj matene li ankaŭ eliris, por mortigi la beston, sed li trovis ĝin jam morta. Li do kunportis la kapojn kaj ŝajnigis sin la efektiva mortiginto.

La reĝo ne povis fari alion ol obei sian promeson kaj akcepti la ĉambrolakeon kiel fiancon de sia filino. La tago por la geedzigo estis destinata kaj la tutaj urbo ruĝe ornamata.

Petro, ĵus revenante post ekskursio en la ĉirkaŭajon de la urbo, vidis de malproksime grandan ruĝan flagon flirtantan sur la palaco de la reĝo, kaj, rajdante pli proksimen, li trovis ĉiujn domojn ruĝe drapiritajn. Li do denove demandis sian mastron, kion tio signifas, kaj sciigis, ke hodiaŭ estas la tago de la edziniĝo de la princino. Li demandis, kiel tio povas okazi, kaj oni respondis al li, ke la ĉambrolakeo de la princino mortigis

la drakon kaj alportis al ŝi ĉiujn sep ĝiajn kapojn.

Petro tiam iris en sian ĉambron kaj skribis sur papereto, ke la princino favore donu al la prezentanto de la papereto ion de la edziĝa tablo por lia sinjoro. Tiam li prenis sian fajfileton, fajfis per ĝi, kaj bela blanka pudelo aperis. En ĝian bušon li pendigis korbeton, enmetis la papereton kaj sendis la pudelon en la reĝan kastelon.

La hundo serĉis sian vojon meze inter la korteganoj kaj venis kun la korbeto al la princino. Si miris multe, tiel pro la bela pudelo kiel pro la deziro de la sendinto. Si prenis de la tablo kukopecon kaj floron, metis ilin en la korbeton kaj la hundo malaperis kun ĝi. Post mallonga tempo la pudelo jam realportis la korbeton al Petro. Li tre ĝojis pri ĝi kaj post kiam tio sukcesis, li sendis la pudelon duafoje al la princino, sed nun li metis leteron en la korbeto.

La pudelo atingis kun sia sendajo denove felice la princinon, kiu akceptis la leteron kaj legis ĝian enhavon, ke ŝia fianĉo estas trompisto, ĉar ne li mortigis la drakon, sed fremda kavaliro; oni esploru la kapojn de la drako, ĉu langoj ja estas en ili.

La princino tuj donis la leteron al sia patro. La reĝo igis kontroli kaj oni trovis efektive, ke la kapoj ne enhavas langojn.

La reĝo tre koleris; li arestigis la ĉambrolakeon kaj ediktigis en la turbo, ke la vera mortiginto de la drako prezentu sin.

Petro fine superis sian timemon; li prenis la sep langojn kaj iris kun ili al la reĝo. Tiu tre miris kaj samtempe ĝojis, vidante antaŭ si tiel belan bonforman kavaliron. La ĉambrolakeon li tre kontraŭvole estis akceptinta kiel bofilon, kaj ankaŭ la princino nur, por plenumi sian devon, estus sekvinta lin ĝis la altaro.

Sed nun ĉiuj trovis helpon. La princino estis tre kontenta pri la ŝango, same tiel la reĝo kaj la popolo. La trompiston trafis la kolero de ĉiuj. Oni vippelis lin ekster la urbon kaj Petro edziĝis kun la princino.

Sed antaŭ tio li serĉis en la arbaro, kie li estis travivinta la tempon de sia juneco, sian patrinon, vestigis ŝin konvene kaj kondukis ŝin al sia fianĉino.

Oni konstatis, ke la reĝo estas ŝia frato. Kiam lia fraterno tiutempe estis malaperinta, li multe ploris kaj serĉis ŝin, ĉar oni kaŝis al li, ke li per la krueleco de lia patro tiamaniere perdis sian fratinon.

La ĝojo de la gefratoj estis do tre granda, kiam ili post tiom da tempo kaj ĉe tiel eksterordinaraj cirkonstancoj revidis unu la alian. Kaj post tio ili kune vivis tre harmonie ĝis ilia morto.

El la germana lingvo tradukis,

J. SCHRODER.

Patrino—*Ĉu vi havas ion per kio vi povos pagi la veturpagon?*

Filino—*Jes, patrino; mi havas Georgon.*

* * * * *

“*Patro*,” diris la saĝa knabo, “*kio estas leĝobeanta burgo?*”

“*Nuntempe*,” penseme diris la patro, “*la priskribo malpligrandiĝas ĝis tiu kiu ne posedas aŭtomobilon.*”

KICKS AND KOMMENTS

Many folks who are inclined to criticise their neighbors would do well to "step aside and watch themselves go by."

"Nobody with sound judgment would liken the Sept. 1913 number with the number of a year ago. Then we American Esperantists had a *real* journal not a bunch of anecdotes poorly translated. The A. E. had the appearance of being a serious publication devoted to a serious cause; Now it looks like the Official Organ of the Association opposed to the Installation of Bathrooms in Air-Ships." (One would almost think he was kicking!—Red.)

"Our whole.....group has nothing but praise for your splendid efforts in every department of the paper. With all due respect for the former management, we think that the new one shows 100% improvement. Why not transfer the kickers' subscriptions to the War Cry, Doan's Almanac, or some equally live sheet."

"Like the Amerika Esperantisto first rate—what there is of it, and I guess there is as much as we are paying for and then some."

"Please accept my congratulations on the excellence of the Esperantisto under the new management. I hope the time may come soon when it can be made larger; I will not say better, for I really can see nothing that one could suggest for its betterment, except in the matter of size."

"Regarding your Kicks and Komments corner, I have read this page with interest each month, and from what I have gleaned from it, would say that the majority is well pleased with the change in the magazine (I'm with the majority), and the plimulto counts."

"Amerika Esperantisto for Sept. deserves hearty commendations. It is excellent in every way. Congratulations."

"I am well pleased with the new appearance of Amerika Esperantisto —'Things do move.'"

"Enclosed please find check for \$1.00 to be used for green ink in order that you may give your cover the appearance of an Esperanto publication." (Thanks: Send another \$ and we'll do it again next month.—Red.)

"Mi ne povas mastrumadi sen Amerika Esperantisto, tial mi enmetas ĉi kune du Sm. daŭrigi mian abonon."

"Pri la nuna A. E. mi opinias kun la 'subredak.' ke ĝi baldaŭ estos 'Eminentulo'."

"If I should kick up any komment koncerning the rejuvenated Amerika Esperantisto, I would say that the editorial in the August issue and Prof. Privat's excellent article which followed it were worth to me the price of a year's subscription."

GLADISO—Kiam Jako proponis edziĝon al mi hieraŭ, li diris ke li volus morti pro mi.

MURIELO—Kion vi diris al li?

GLADISO—Konsideru sin mortulo.—*Judge.*

* * * * *

"Cu ŝi estas bona muzikanto?"

"Tre bona. Si scias kiam ĉesi."

* * * * *

Infanetoj heredas kisojn, geamantoj interŝanĝas ilin, maljunuloj aĉetas ilin.—*Life.*

* * * * *

GERTRUDO—Kiam Tomĉjo petis kison al vi hieraŭ vespere, ĉu vi donis iom al li?

GENEVIEVE—Ne—sed mi pruntedonis iom.—*Life.*

* * * * *

"Kial vi opinias ke li estas fremda nobelulo?"

"Mi aŭdis lin diri ke li ŝuldas ĉion al sia edzino."—*Judge.*

* * * * *

PATRO—Vi sensenculo. Mi donos al vi nur milionon da dolaroj.

FILO—Se vi faros tion mi malhonoras la familion. Mi ĉirkaŭveturos en uzita aŭtomobilo.—*Judge.*

* * * * *

"Ili estis geamikoj kaj sidis flankon ĉe flanko ĉe festeno. Li parolis kaj ŝercis sed ŝi ne aŭskultis. Fine ŝi diris:

"Mi suferas mizeron."

"Kial?" diris li.

"Antaŭ ne longe oni inokulis min kontraŭ la variolo, kaj ĝi belege funkciis. Mi povas preskaŭ ekkrii, ĝi tiel dolorigas min."

Li rigardis ŝiajn belegajn brakojn, kaj vidante neniu signon, li diris, "Kie oni inokulis vin?"

Dolĉe ridetante ŝi respondis, "En Bostono."

* * * * *

UNUA EDZO—Mia edzino neniam estas feliĉa kiam mi estas nevidbla.

DUA EDZO—Nek mia edzino fidas al mi.

* * * * *

PATRINO—Joĉjo, ĉu vi estas lavinta la manojn?

JOĈJO—Jes, panjo. Se vi ne kredas ĝin, rigardu la vištukon.

BUY BOOKS WITH A
COUPON TICKET

You get \$5.50 in coupons for \$5.00, or \$11.00 for \$10.00. The saving in money is good, but the saving of time is better. Quick and convenient—if you want three books, worth \$1.65, you just cut off \$1.65 in coupons, and mail them with your order. If, as sometimes happens, the 35-cent book is out of print—back comes a 35-cent string of coupons and the transaction is closed. No waiting at the post office window for a money order!

Convenient? That's where we get even—it's so convenient that it makes ordering books a positive pleasure.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
WEST NEWTON, MASS.

BOOKS! MAGAZINES!

We take this occasion to announce that all Magazine Subscriptions or Orders for Books of any nature published in U. S. may be sent to us, and will command the most prompt and careful attention

Magazine Subscriptions received at Publisher's Prices

CLUB RATES QUOTED upon application

Help make this addition to our business a success. Send in your renewals or new subscriptions to your favorite periodicals TODAY

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.
West Newton, Mass.

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATA ILUSTRATA REVUO
(fondita en la jaro 1909).

Ciu jarabonanto ricevos *senpage* la libron:

"ORIENTA ALMANAKO"

el la lingvoj *japana, hina, araba, hinda, sanskrita, persa, armena, kartvela k. t. p. k. t. p.*

"La Ondo" aperas akurate la 1-an datan, novstile. Ciu n-ro havas 16—24 pag. Formato 17x26. Bela kovrilo.

(Pošt. ilustr.)

Sendu abonpagon (\$1.10) alla American Esperantist Co., West Newton, Mass.

POLA ESPERANTISTO

Monata gazeto, aperadas okan jaron, ĉiam pliinteresigante sian programon.

En 1913-a jaro "P. E." krom 12 ilustrataj, zorge redaktataj numeroj en klasika, pure fundamenta Esperanto, donos al siaj abonantoj senpagan:

"LITERATURAN ALDONON"

(200 paĝa volumo)

Sendu abonpagon (\$1.40) al la American Esperantist Company, West Newton, Mass.

LA VOĆO DE L' POPOLO

Ciusemajna hina kaj Esperanta Gazeto pri ĉio kio kondukas socian revolucion kaj progresigas universalan tunuigón.

Jarabono por eksterlando:

Sm. 2.50; unu numero: sd. 5 per poštmandato aŭ respondkupono

Adrese Sifo. 8 Chiin-Sin Tung Str., Sai-Kwan, Canton. (Hinujo)

LA REVUO

The only magazine which has the constant collaboration of
DR. L. L. ZAMENHOF, the author of *Esperanto*

Yearly Subscription \$1.40

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc., Agts. for U.S.A.

N. B.—The American Esperantist Company has on hand a quantity of back numbers, equally as good as current numbers from a literary point of view. These we will dispose of, as long as they last, at ten cents a copy, twelve copies for \$1.00. We cannot guarantee to send any special numbers at this rate.

TO NON-EPERANTISTS:

Ask your enthusiastic Esperantist friends for a small English grammar of the language. Every *real* Esperantist carries a number of this handy little propagandilo.

25 Keys for only 25 cents. 100 for only One Dollar.

The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

You Ought to take SCIENCA GAZETO

A monthly magazine entirely in Esperanto, devoted to Science and Industry.

Contains semi-technical articles on many interesting subjects. Subscribe for your own pleasure—and show each copy to some scientific friend.

Send Subscription (\$1.50) through
The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

(Sample copy, 20 cents)

Foreign Magazines

Twelve copies, our selection, back numbers, for only sixty cents

The American Esperantist Co., Inc.
West Newton, Mass.

*The best literary magazine
entirely in Esperanto . . .*

Single Copy, postpaid 15 cents

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc., Agts. for U.S.A.

The American Boy



The **SAFE** boys' magazine
Twelve months of **Only \$1 a year**

All boy for all boys, nota child's paper. Clean as a whistle, full of pictures, 33 to 44 pages every month. Manly, inspiring stories of travel, adventure, athletics, history, school life, written by most popular boys' authors. Instructive special articles. Fine articles on football and other sports. Departments of Mechanics, Electricity, Photography, Popular Science, How to Make Things, Stamp Collecting, Chickens, Pots, Gardening, Inventions and Natural Wonders.

THE AMERICAN BOY		
Regular Price, One Year	...	\$1.00
AMERIKA ESPERANTISTO		
Regular Price, One Year	...	1.00
Regular Price for both	...	\$2.00
SPECIAL PRICE FOR BOTH	...	\$1.70

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.
West Newton, Mass.

Read by 500,000 BOYS

—and endorsed by their parents

ĈU VIAJ PIEDOJ ĜENAS VIN?

Portu la "Simpson" "Higena" sanigajn alplandojn en viaj ŝoj. Sub viaj piedoj restas pura, saniga, subŝtofo. Tuj sendolorigas tiun lacen dolorsenton kaj nepre kuracas kalajojn. Varmigas la piedojn dum la vintro kaj malvarmigas dum somero. Prubo konvinkos vin pri ilia valoro. Sendu la mezursignon de viaj ŝoj.

Afrankite, 36 cendoj (Sm. o, 60)

ALBERT E. SIMPSON,

39 Webster St., E. Lynn, Mass.

IT PAYS TO ADVERTISE

IN A. E.

NEW EDITION ! THE WHOLE OF ESPERANTO

EXCELLENT PROPAGANDA MATERIAL ORDER TODAY

5c per copy

10 for 25c

50 for \$1.00

Contains Grammar, Vocabularies and a Little Story. Just the thing to interest your non-Esperantist friends.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.,

West Newton, Mass.



“Dum mia longa profesia kariero kiel instruisto de muziko mi uzis la Emerson’ Fortepianon.

“Antaŭ jaroj mi eksciis ke la tono de la Emerson’ estas plej bone adaptita por instrui la orelojn de la komencanto; ke la elasta respondema tušo kutimigas la manon por elsonigi ĉiujn el tiuj pli subtilaj muzikaj esprimoj, kiuj montras la veran artiston, kaj ĉarmas la muzikamanton. La tempo provas ĉion. Dum la severegaj provoj kiujn komencantoj nepre okazigas al fortepianoj mi konstatis ke la Emerson’ montris tian daŭrecon, kia pruvis bonegecon de materialo kaj konstruado. La Emerson’ progresis kune kun la pasado de la tempo. Multegaj el miaj gradatigintoj elektis la Emerson’ kiel tutvivan amikon.”

De antaŭ pli ol 60 jaroj tiuj homoj, kiuj postulas bonegan kvaliton je justa prezo, alte ŝatas la Emerson’.

*Vendistoj en la ĉefaj urboj de Usono
Petu ilustritan katalogon.*

EMERSON PIANO CO., Boston, Mass.